

Johann Wolfgang von Goethe,
Kanto de la spiritoj super la akvoj

tradukita de Willy Nüesch

La homanimo
Similas al akvo:
De l' ĉielo ĝi venas,
Al ĉielo ĝi iras,
Kaj infren ree
Al tero ĝi devas,
En ŝanĝo eterna.

Kiam de l' alta,
Kruta rokmuro
Fluas la pura radio,
Ĝi polvas plaĉe
En nubaj ondoj
Al glata roko,
Kaj mildakceptite
Ĝi ondas vuale,
Softmuĝe
Al la profundo.

Kaj se rifoj
Kontraŭas la falon,
Ĝi ŝaŭmas indigne
Ŝtup-post-ŝtupe
Abismen.

En malprofunda fluejo
Ĝi rampas tra l' valo herbeja,
Kaj en la glata lago
Paŝtas sian vizaĝon
Astroj ĉielaj.

Vent' 'stas amanto
Ĉarma de l' ondo,
Vent' miksas funde
Ondojn ŝaŭmantajn.

Vi, homa animo,
Similas al akvo.
Vi, sorto de l' homo,
Similas al vent'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Gesang der Geister über den Wassern” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-504-1025 (2013-08-28 18:48:20)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en la interreta poem-kolekto “Argiope.poezio.net”.